

# Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 2 2014

Ĵaŭdon la 13an de marto

62a jaro

## Kalendaro

Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la **18a** (krom la sabata).

**MARDON la 1an de aprilo** (sem. 14) – *TIRSDag*

"Esperanto elektronike". Ni esploras la multenhavan lumdisk-egon (DVD) de E[a]I 2006.

*"Esperanto elektronisk". Vi ser gjennom denne omfattende DVD: kurs, filmer, artikler, ordbøker ...*

Daŭrigo de la jarkunveno: **vd. p.4**

*Fortsettelse av årsmøtet: se s. 4.*

**Mardon la 6an de majo** (sem. 19) – *tirsdag*

1814 kaj la konstitucio. Kia estis la norvega "revolucio"? Kion ni celebras efektive?

*1814 og Grunnloven. Hva består den norske "revolusjonen" i? Hva er det vi egentlig feirer?*

Provo: Ĉu vi preferas –

Prøve: Foretrekker du –

**SABATON la 10an de majo** (sem. 19) – *LØRDAG kl.13 – je la 13a*

Ripeto: "1814 kaj la konstitucio".

*Reprise: "1814 og Grunnloven"*

**Lundon la 19an de majo** (sem. 21) – *mandag*

"Esperanto estas la plej malfacile ellernebla lingvo ... devigas nin senĉese obei logikon. Tia penado estas kontraŭnatura" (Lanti). Ni diskutos!

*"Esperanto er det vanskeligste språket å lære fullt ut ... tvinger oss ustanselig å følge logikken. Et slikt strev er unaturlig"(Lanti) Diskusjon*

**Mardon la 3an de junio** (sem. 23) – *tirsdag*

Studkunveno: *-iĝi* kaj *-igi*. Ĝusta uzado de ne/transitivaj verboj,

*Studemøte: suffiksene -igi og -iĝi. Riktig bruk av in/transitive verb.*

**Lundon la 16an de junio** (sem. 25) – *mandag*

Ĉu la reguleco de Esperanto montriĝas (montriĝu?) en la instru-metodiko jam en la unuaj lecionoj?

*Har esperantos regelmessighet (eller bør den ha) følger for metodikken i begynnerkurs?*

# OKAZIS

## **Lundon la 20an de januaro**

Esperanto havas plurajn bonajn trajtojn, kiuj tre faciligas la lernadon: precipe la fonetika skribo, la reguleco de la gramatiko, la gramatikaj finaĵoj kiuj klare indikas la funkcion de la vortoj, kaj la libera uzo de afiksoj kiel *ek-*, *mal-* kaj *-aro*. Sed Esperanto ne estas perfekta lingvo, kaj ni konfesu ke ĝi havas ankaŭ diversajn malfacilaĵojn. Plej stumbligaj estas la uzo de *-n*, la transitiveco de verboj (ankaŭ la senpera verbigo de substantivoj) kaj la reflektivaj *si* kaj *sia*. Tiuj ŝajnas prezenti defion al ĉiuj lernantoj (ĉi-lastaj ankaŭ en la skandinavaj lingvoj!). Aldone la uzo de la difina artikolo *la* estas malfacila por tiuj kiuj ne havas ĝin en sia propra lingvo, kaj diverslingvanoj malfacile distingas inter kelkaj el la fonemoj, ekz-e skandinavoj pri *s* kaj *z*, kaj orientazianoj pri *l* kaj *r*. Tamen sume la malfacilaĵoj de Esperanto estas malpli ĝenaj ol tiuj kiujn renkontas lernanto de ajna nacia lingvo.

## **Mardon la 4an de februaro**

Pluraj radiostacioj regule sendas radioprogramojn per la reto, vd. liston ĉe [eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-radio](http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-radio). Per la komputilo de Cato ni ĉerpe aŭskultis ĵusajn sendojn el Varsovio, Pekino kaj Havano kaj ankaŭ el la retejo de Anton Oberndorfer, kiu ĉiutage voĉlegas aktualan artikoleon, sam-

tempe montrante la tekston. Poste ni trovis kaj gustume spektis didaktajn filmojn en Esperanto: *Mazi*, *Gerda malaperis* kaj *Pasporto al la tuta mondo* – kaj la informfilmon *Esperanto estas*. Jen multo montrinda al komencantoj kaj interesigantoj!

## **Lundon la 17an de februaro**

Ni memoris kelkajn bonajn ekzemplojn de heredoj kaj donacoj kiuj stimule funkciis en la E-movado: la Legaco Uhlen, nia domo Esperantonia, la fondaĵo Gustavsen, la donaco kiu ebligis eldonon de la norvega–Esperanta vortaro kaj – ekster la movado – la Nobel-premioj. Ni esploris pri la leĝaj postuloj pri valida testamento, diskutis pri diversaj celoj por donacoj, Esperantaj kaj aliaj, kaj konklude kolektis kelkajn faktorojn kiujn oni atentu, elektante inter organizoj: jama kapitalo kaj bezono, efika kaj rapida uzo de la mono, haveblo de jurista konsilo, ricevado el ŝtata aŭ alia fonto, kaj daŭra videblo de la nomo de la donacinto.

## **Mardon la 4an de marto**

Jarkunveno de la klubo. Vd. p.3.

## **Lundon la 17an de marto**

Kial homoj lernu Esperanton, nun en Norvegio en 2014?.

De la praktika valoro de Esperanto ni kune trovis plurajn bonajn ekzemplojn – turisma vizito aŭ ekloĝado en fremda lando, Biblia

kurso kaj propedeŭtika efiko. Ideologie Esperanto daŭre superas etnajn lingvojn pro sia relativa neŭtraleco. Tamen ni povis el propra sperto konfirmi la konstaton ke la lingvon homoj eklernas ne pro la ideologio sed pri ĝenerala lingv-

emo aŭ pro hazarda konatiĝo. Sed konscio pri la ideologio aktivigas kaj restigas homojn en la movado. Ni konkludis ke la mondo ne tiom ŝanĝiĝis ke la klasikaj argumentoj por uzado de Esperanto perdis sian validon.

---

## Raporto pri la ĝenerala kunveno mardon 4. marto

Ni faris kelkajn korektetojn kaj aldonojn al la dissendita **jarraporto** 2013:

[A. Ekstera agado]

– La frazo "Planita informbudo ..." foriĝu. (Ĝi koncernas 2012.)

– Nova alineo:

### Afiŝoj pri prelego

Dispendiĝis afiŝoj pri la publika prelego de Otto Prytz pri Zamenhof kaj Aasen kadre de la landa kongreso.

[B Interna Agado]

– Nova unua alineo:

**Landa kongreso.** La klubo estis teknika aranĝanto de la Landa Kongreso en Haraldsheim 14 – 16 junio.

– Post "La klubo .... kaj aŭguste" aldoniĝu:

La unua oktobra kunveno ŝoviĝis al la 30a de septembro.

– Sub "Partopreno en internaciaj kongresoj" foriĝu:

Unu klubano partoprenis en la internacia fervojista kongreso.

(Ĉar ni limigu tiun rubrikon al la kongresoj de UEA kaj TEJO.)

– Sub "Subvencia fonduso ... " aldoniĝu:

La junulaj membroj ricevis sciigon pri la fonduso retroŝte, sed la estraro ne agis laŭ la regularo, anoncante limdaton en la *Bulteno*.

Malprofito: 4 532 kr.

Aprobiĝis la **jarraporto** kun la akceptitaj ŝanĝoj.

La **jarkalkulo**: Novan version ni dissendas kun ĉi tiu *Bulteno* kaj traktos en daŭriga kunveno mardon la unuan de aprilo.

**Elektroj**: Ni reelektis la jenajn estraranojn: prezidanto: Kjell Peder Hoff,

sekretario: Douglas Draper, kasisto: Harald Rygg .

La ceteraj elektoj, anstataŭantoj de la estraro, revizoro, domkomisiono, elekta komisiono: prokrastitaj ĝis mardo 1. aprilo. **Kandidatoj serĉataj!**

---

## **Daŭrigo de la jarkunveno / *Fortsettelse av årsmøtet, mardon / tirsdag 1. aprilo***

Jarkalkulo (kunsendita). Kaj elekto de du anstataŭantoj en la estraro, revizoro kaj domkomisionano, ambaŭ kun anstataŭanto Ankaŭ de elekta komisiono.

*Regnskap (vedlagt). Og valg av to vara til styre, revisor og representant i huskomiteen, begge med vara – samt valgkomité.*

---

## **Ekskurso al Eidsvoll?**

Ni konsideras aranĝi **ekskurson al Eidsvoll** por viziti la Eidsvoll-domon (ĉe *Eidsvoll verk*) aŭ la muzeon (en *Eidsvoll bygdetun*), kun ĉiĉeronado en Esperanto. Transporto verŝajne per du (?) privataj aŭtoj. Ŝajnas ke tio devos eventuale okazi en iu sabato, ĉar vespere ne sufiĉus la tempo.

Se vi (eble) interesiĝas, bv. anonci vin al nia oficejo.

---

## **Fondaĵo Kjell kaj Aase Gustavsen**

Ni memorigas pri la kluba Fondaĵo Gustavsen. Ĝi estis starigita en 2004 per granda donaco de Kjell (1915–99) kaj Aase Gustavsen por subvencii junularan aktivadon – precipe vojaĝojn por serĉi inspiron ĉe la E-movado en eksterlando, sed ankaŭ alian agadon el kiu povas profiti la Oslo-kluba junularo.

El la gvidlinioj: "*Støtte gis normalt bare til klubbmedlemmer under 30 år, men kan også i spesielle tilfeller gis til andre klubbmedlemmer. Medlemmene kan søke individuelt eller gruppevis.*" Limdato por petskriboj al la kluba estraro (per la oficeja adreso <oficejo[a]esperanto.no>): 2. majo.

---

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18\*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94

Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo al Sinsen.

\* inng. Schouterrassen. [www.esperanto.no/oslo](http://www.esperanto.no/oslo) Retpoŝto: oficejo[a]esperanto.no  
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper